E. ARCHDEACON

# LA MISTERO DE NIA SURTERA EKZISTO

Esperantigita de
k-do André Caubel

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
131A * 1979 * 3,50 FF

## Antaŭparolo de la aŭtoro

Oni legos ĉi-sube verketon, kiun mi tutfaris en 1944, ĉe la fino de la milito, kaj kiun mi reproduktas senŝanĝe.

Ŝajnas al mi utile, klarigi, kial la katolika religio ankoraŭ pluekzistas malgraŭ sia evidenta kadukiĝo, kaj kiel oni povis ĝin startigi en la mondo, en antikva epoko, kiam la profunda nescio de la homoj ilin "helpis" ĉion akcepti.

Io kuriozege konstatinda kaj komentinda estas, ke burĝoj kaj laboristoj estas egale nekredantoj laŭ la kristana vidpunkto ; sed dum la laboristoj sin energie proklamas nekredantoj kaj dum ne unu el mil frekventas la meson, la burĝoj ludas al ni la komedion de kredo, dum ili valoras en sia tuto ege malpli ol la nepraktikantaj laboristoj. Verkistino kun nenegebla talento, Marcelle Capy, kiu en 1914 faris serion da rimarkindaj artikoloj kontraŭ la milito en pacistaj gazetoj, kaj libron ne malpli rimarkindan kun titolo "Ina voĉo el la miksbatalo", faris pri la franca burĝo belegan difinon, difinon, kiun mi admiras, des pli ke inter tiuj burĝoj mi naskiĝis kaj mi estas plej bone lokita por taksi ĝian pravon.

"Ĉio tio okazas per la kulpo de la senkompata egoismo de la franca burĝaro, satplena de antaŭjuĝoj, malsateganta profitojn, kaŝanta siajn malvirtojn kaj sian lepron sub la robo de pieco, sian kruelon kaj stulton sub la faldoj de la naciistaj standardoj ; tiu burĝaro, kiun fuĝas la plej inteligentaj el ĝiaj idoj, kiel oni fuĝas putrintan kadavron ; tiu burĝaro, kiu monavide donis sian oron al la caro por starigi pendumilojn, sed kiu ne havas eĉ unu groŝon por kontribui al la disvolvo de la propra industrio; kiu malamas la gelaboristojn, dank'al kiuj ĝi sin stern-

aĉas en la riĉeco ; kiu individuismas ĝis preferi mortaĉi ol doni eron el si mem al la kolektivo ; kiu estas en Francio kvazaŭ ŝankro sur bela vizaĝo ; kiu trinkas ĝian sangon, manĝas ĝian karnon, ronĝas ĝian forton kiel nesatigebla vampiro ; kiu sufokas la junajn energiojn. Animon ĝi ne havas kaj neniam havos".

Tiu pentraĵo estas severe ekzakta :

Laŭ tio, kio koncernas min, mi ĉiam havis la naturan alvokiĝon helpi, ĉiarimede kaj per mia modesta riĉo, la morgaŭajn progresojn, kiel aŭtomobilo, aviado, esperanto ktp... Pro tio mi havas neniun malmodeston. Ne estis pro altruismo ; estis pro la fanatika deziro ŝprucigi iujn el la eksterordinaraj sciencaj progresoj, pri kiuj la nuna epoko ĉiutage donas al ni la pasiigan spektaklon.

Mi neniam trovis ĉe la min ĉirkaŭantaj burĝoj la plej malgrandan monhelpon, la plej malgrandan akcelon por miaj kampanjoj. Mi faris en la popoluniversitatoj prelegojn pri aviado kaj pri esperanto, antaŭ 600-personaj ĉeestantaroj, kaj oni povus aŭdi flugantan muŝon. Kaj post la prelego, 30 aŭ 40 el la aŭskultintoj ankoraŭ venis por peti de mi sur la podio komplementajn klarigojn. Mi neniam povis proponi tiajn prelegojn antaŭ burĝoj, ĉar ili ne aŭskultus min kvin minutojn. Ili estas hontinde avaraj por helpi la progreson ; sed ili estas, mi tion konfesas, tre donacemaj por helpi la kristanan kulton; kiu sen ili estus jam morta, ĉar tiu ĉi ricevas neniun ŝtatan helpon.

Burĝaj moŝtoj diras : "Necesas religio por la popolo". Traduku : "la avangardaj partioj estas terure danĝeraj por nia kaso, kaj iliaj prozelitoj iun tagon eble volos veni amasope nin tutrabi. Necesas do igi plejeble nemalicaj ĉiujn tiujn homojn, kiuj estas nekleruloj, minacante ilin per la inferaj punoj".

Burĝaj moŝtoj ja eraras : ĉiutaga sperto montras al ni, ke la timo pro infero neniam malhelpis virinon malobei la naŭan ordonon, dum la timo pro idonasko ŝin haltigis kelkfoje. Timo pro Infero neniam haltigis francan reĝon (kaj eĉ multajn papojn) sin regali per nenombreblaj amoristinoj kaj eduki sennombrajn bastardojn kaj adultajn idojn. Dumtempe, por kompensi, sub instigo de la katolika Eklezio, ili pereigis centojn

da miloj da protestantoj kaj estigis la amasopan elpatriiĝon de miloj da distingindaj Francoj.

Do, la burĝaj moŝtoj, kiuj neniam havas unu soldon por helpi la progreson, ĉiam havas monon por helpi la religion, por disvastigi ĝiajn instruojn stultegajn kaj ĝian malkleremon, kaj la tuta mono donata al religio estas deprenata de Scienco kaj progreso. Tiuj samaj burĝoj, apud la aspergilo ĉiam amis la glavon, ja utila antaŭ minaco de revolucio, kiu al la kaso de la riĉuloj riskigus katastrofon. Ĉar la ŝtato subvencias neniun kulton, nur la riĉularo nutras ilin. Se ili ĉesus sian kontribuon al la Petrogroŝo, ambaŭ niaj francaj kristanaj religioj sinkus en malpli ol unu jarcento.

Ĉio ĉi estas dirinda, por konstati el kie la kristana religio tiras sian potencon, kiu ian belan tagon, eble malaperos tre rapide ; la proksimaj vizitoj, kiujn certe niaj nepoj faros al la najbaraj planedoj, evidente malaperigos subite la miton de la Sanktaj Skriboj.

Ties verkintoj evidente ne antaŭvidis la vastegecon de la universo nek la plurecon de la loĝataj mondoj...

Ernest ARCHDEACON.

# MI POSTULAS LA ŜLOSILON DE LA MISTERO DE NIA SURTERA EKZISTO

Nekontesteble la mondo prezentas serion da aferoj mirindaj, kiuj "ŝajne" malkaŝas grandan inteligenton ; kaj naturo foje havas grandajn belojn.

Sed apud tiuj belaĵoj kaj la ĝuoj, kiujn ili foje povas doni al ni, kiom da malbelaĵoj, da nejustaĵoj, kiom da nekompreneblaj suferoj venas ŝarĝegi la kompatindan homaron. Sen ia ombro da dubo la sumo de la mizeroj al ĝi trudataj estas nemezureble pli granda ol la sumo da ĝuoj, kiujn ĝi spertas sur nia planedo.

Tio estas tiom vera, ke por trovi klarigon por tiu priplorinda stato de la aferoj, la redaktintoj de la biblio devis imagi la mirigan historion de nia patrino Eva, kiu manĝis la pomon malgraŭ dia malpermeso ; kio kaŭzis ŝian elpelon, kun Adamo, el la Tera paradizo, kaj la sennombrajn suferojn truditajn al ŝiaj idoj, "vivintaj, -antaj kaj -ontaj".

Kion oni dirus pri lando sur nia planedo Tero, en kiu la leĝofaristoj kondamnus homon, kulpan pro eta kulpo, je senfina mallibero, kaj ĉiujn liajn idojn je la sama puno ? Oni dirus, ke tiuj leĝistoj estas frenezaj aŭ bestkruelaj. Tiel agas tiu "senfine bona Kreinto", kiun kristanoj nomas sia patro kaj dankas ĉiutage per siaj preĝoj, ke li donis sian vivon por ilin "elaĉeti" (?) kaj ke li superŝutas ilin "per senfine nombraj favoroj"!!

Nekalkuleblas la plagoj, kiuj ŝarĝegas homaron : uraganoj, tertremoj, marpuŝoj, inundoj,

rabbestoj, venenbestoj, ĉiaspecaj malsanoj plej naŭzaj, epidemioj, militoj, ktp, trafas sendistinge la homojn, kiuj ilin malplej meritis.

La sciencistoj el ĉiuj landoj povis, dank'al nelacigeblaj penoj, nin ŝirmi pli-malpli de tiuj kataklismoj, de tiuj terurigaj mizeroj, kaj "iomete" plibonigi la situacion, kiun "Bonfarema Dio" faris al ni ; sed restas ankoraŭ al ili "diable" multe por fari.

Jen plua tre eleganta ŝerco de la Kreinto :
Li donis al ni tre mastremajn instinktojn, ekz. tiun de la reprodukto de nia specio, kiu sin trudas al ni, foje tre krude, en ĉiu sezono, sed li malpermesas ĝin kontentigi eksteredze, dum ĉiuj, viroj kaj inoj, ne ĉiam havas la eblecon edziĝi, kaj dum okazas sufiĉe ofte, ke edzo kaj edzino estas devigataj disiĝi dum sufiĉe longaj periodoj; kaj sekve estas tie malpermeso neakceptebla, kiu estas ĉiam malobeata.

Sed ne nur tio.

Ŝajnus, ke la ago seksa kuniĝo idokreonta devus esti pli ol ĉiuj admirinda kaj poeziigita ago tipe, kies "ritojn" oni "devus" afiŝi sur la fasadoj de ĉiuj niaj monumentoj publikaj. Dio organizis ĝian realigon "en la tuja najbareco de la partoj plej malpuraj kaj naŭzaj de nia malnobla korpo ; kaj li ĉirkaŭigis tiun agon per tiom da kaptiloj kaj mizero (ekz. la naskiĝo de senpatraj infanoj), ktp, ke la plej multaj civilizitaj popoloj eĉ punis tiujn, kiuj parole aŭ skribe donis detalojn pri tiu "granda ago". Kaj ĉiuj same uzas, preskaŭ ĉiam tute vane, la plej nekredeblajn antaŭgardojn por kaŝi al siaj geidoj, kaj speciale al la inoj, ĝis la edzoaĝo, la "ritojn de la ofero".
Ĉu tio ne estas kruela ludo, kiun la kreinto povus ja ŝpari al si nin spertigi en tia nekohereco, kaj, plian fojon, meze de tiom kruelaj tentoj ?

Nu, ekzemploj svarmas pri abomenindaj malsanoj,

trafitaj sekve de simpla kiso aŭ de tiuj timindaj seksaj rilatoj. La nombro de la kontaĝaj malsanoj tiel suferitaj estas vastega. Tie ankoraŭ la laboroj de ĉiuj tutmondaj scienculoj povis bremsi tiujn kontaĝojn, detruante kelkajn el la plej teruraj mikroboj imagitaj de tiu bonfara kreinto ; ili tiel mildigis multajn dolorojn per la anesteziloj kaj multe plilongigis la mezan vivon, almenaŭ en la civilizitaj landoj.

En la sovaĝaj popoloj, kiujn ne penetris la homa civilizo, tiuj kompatindaj estuloj, kiuj tie naskiĝis, ankoraŭ hodiaŭ progresis pri nenio.

Tiu "bonega patro" laŭ la kristanoj nin ĵetis tutnudaj sur tiun ĉi teron, lasante nin senpente elturniĝi mem meze de la mizeroj kaj kataklismoj nenombreblaj, per kiuj li nin ŝarĝegas.

Kaj la kristanaj moŝtoj ripetas ĉiutage, en siaj preĝoj, ke "nenio okazas ĉi-tere sen lia ordono aŭ permeso..."

Do kun lia permeso la planedo preskaŭ tuta mergiĝis dum kvar jaroj kaj duono en senprecedenca en la mondo kaj nevidita koŝmaro. Kaj evidente li bezonus nur levi fingreton por ĝin haltigi.

Iuj do dirus al mi :"Dio estas senfine bona; ja la homoj estas malicaj".

Mi respondos, ke ili foje estas malicaj, sed ke ilia responseco estas ĉiam dubebla, ĉar la malico de homo plej ofte estas la rezulto de heredaj difektoj aŭ malsanoj, kaj de la maniero, laŭ kiu li edukiĝis. Kaj cetere, kian gravecon povas havi la vivo de homo por liaj samtempanoj, kiam li vidas ĉiajn plagojn ruinigi la teron kaj kiam Dio tiel donas al ili la ekzemplon de kruelegeco.

Plie, estas multaj aliaj nesolveblaj proble-

moj restantaj por tre multaj bonuloj, kiuj paliĝis super ili sensukcese.

Jen unu, inter mil aliaj :

La kleraj esploroj de meĥanikistoj ebligis la konstruon de maŝinoj, kiuj memsolaj faras la laboron de cent kaj eĉ mil laboristoj. Oni povus esperi, ke tiuj maŝinoj, obligante per koeficiento giganta la laboron de la manlaboristoj, havigus al tiuj ĉi grandegan bonstaton, produktante per peno ege eta por homo, la aĵojn necesajn por vivi. Nu, tute ne. En tiu lando, kun miriga aktiveco, kies nomo estas Usono, la maŝinoj tiel bone anstataŭis la homojn, ke ĝi elportis dum jaroj, dekdu milionojn da malsatmortantaj senlaboruloj.

Ĉiuj ekonomikistoj, kun la plej bonaj intencoj, penegis en vanaj serĉoj por atingi solvon al tiu problemo. Ĝi tamen havas solvon : tiu ĉiopova kaj ĉioscia Dio, ĉu li ne povus ĝin indiki al ili ?

Paradokse malĝojiga estas la konstato, ke la homoj, efektiviginte sciencajn progresojn svenigajn, kunpuŝiĝas kun malfaciloj novaj, nesolveblaj por ili, kiuj okazas kiel rezultaĵoj de tiuj progresoj. Mi sekve ekpensas, ke la eteta planedo Tero estas abomeninda "veruko en la Universo".

Kiu povis opinii ke, inter tiuj sennombraj grandegaj astroj, kiuj konsistigas la Universon, ĝi sola estas loĝata de inteligentuloj ; kaj nu, kial Dio ĝin farus rezidejo malfavoregata kaj malbenata ? Kial ? Jes, kial ?

La piaj propagantoj de la "Sanktaj Skriboj" diras al oni, ke ilin diktis Dio mem : kiel strange !

Neniam tiuj sanktaj skriboj al ni parolis, kun sufiĉe da precizoj, pri tiuj ĉielaj korpoj disvastigitaj en la Universo.

Nu, Dio, kiu "faris la mondon", ilin ja bone konis : kial li ne revelaciis tiujn mirindaĵojn en la Skriboj de li diktitaj ? Kial necesis, ke la diverslandaj scienculoj mem, iom post iom,

faru tiujn sensaciajn malkovrojn ?

Laŭ la kronologio de la Skriboj, la mondo estus proksimume ses mil jaraĝa ; ĉiuj geologoj en la mondo konsentas por atribui al ĝi proksimume unu miliardon da jaroj.

Eĉ kulmine ! la reprezentantoj de Dio sur la tero (Sankta Oficejo kaj Inkvizicio) devigis Galileon solene malkonfesi antaŭ ili sian malkovron pri rotacio de la tero. Kaj Dio ne malhelpis siajn reprezentantojn fari tiun gigantan mispaŝon (aldoniĝantan al cent aliaj)!

***

Plie, ankoraŭ alio :

Jesuo Kristo venis sur la teron laŭdire por elaĉeti la homojn el la origina peko de nia patrino Eva. Nu, ĉar tre evidente estas, mi ripetas, en nia Universo sennombraj loĝataj mondoj, multaj el ili devis havi sian Adamon kaj sian Evan.

Do necesis milionoj da Jesuo-Kristoj por elaĉeti la loĝantojn de ĉiuj planedoj ??

Kaj kiom da aliaj problemoj tiu Kreinto povus morgaŭ solvi por ni !

Ĉiuj zoologoj konstatis tiun fakton, apriore evidentan por ĉiu homo, kiu kapablas nur malfermi la okulojn, ke "la reĝo de la Kreado" estas la plej degenerinta el la bestoj.

La homo, por la dombestoj, povis ofte krei belajn speciojn, per raciaj hibridigoj de belaj tipoj masklaj kaj inaj. Pri la sovaĝaj bestoj, iliaj specioj ofte estas belaj, ĉar ili disvolviĝis libere, meze de naturo kaj klimato favoraj al ili.

Leŭtenanto Hébert, eksestro de la Remsa kolegio por atletoj, faris rimarkindajn studojn kaj eksperimentojn, sekve de kiuj li establis la plej bonajn mezurojn por korpo de homo

harmonie kreskinta ; li faris tiujn mezurojn sur multaj individuoj kaj li konstatis, ke la homo harmonie kreskinta estas ĉe ni preskaŭ tute ne trovebla. Kaj da ili li trovis multkvante, ĉe la "negroj de Gabono", ĉar tiuj ĉi aŭtomate faras, pro la necesoj de la sovaĝa vivo, kiun ili spertas, la utilajn fizikajn korpajn ekzercojn.

La civilizulo, intelektulo, ĉar faranta neniun korpan aktivadon, tute ne disvolviĝas ; eĉ la manlaboranto, ĉar li faras unu solan movon, ĉiam la saman, sekve de sia profesio, disvolviĝas tute neharmonie.

La korpa perfekteco de geedziĝontoj neniam estas enkalkulata en la homaj geedziĝoj, dum oni prizorgas ekskluzive ĝin en la bredado de la dombestoj.

Kaj tiel la homaj rasoj korpe degeneras, multe pli ĉe la civilizitoj ol ĉe la sovaĝuloj. Tio estas konsola...

Plie, se vere ekzistas unu Dio, kiel li permesas, ke liaj terreprezentantoj instruas la absurdajn teksaĵojn entenatajn en la Skriboj ?

Kiel li lasas ilin instrui la ekziston de Infero, kie ili estas turmentataj, "dumeterne", pro mallongaj kulpoj ofte malgravaj, aŭ ĉar ili mortis sen konfesio ?

Paskal skribis kontraŭ tiu monstraĵo Infero rimarkindan paĝon, kiun mi ne rezignas la tenton citi :

"Kiam mi prezentas al mi tiom da miloj da animoj, kiuj travivis sur la tero, kie plaĉis al Dio ilin naskigi, jen en Gallio, jen Egiptio, jen Hindio, jen en la regno de Budho, jen sub tiu de Konfuceo, de Zoroastro aŭ de Mahometo, sen aliaj zorgoj ol por si akiri, per la konformeco de sia konduto kaj de siaj oferoj, la ĉielan favoron, kaj kiam mi tiel klare komprenas, ke tiuj animoj senmanke ricevis la rekompencon de sia sankteco, per la disvolvo de sia intelekta kaj morala edukado trans tiu ĉi vivo, iĝas mirakle al mia intelekto ke, laŭ vi, tiuj dekmiloj da kreitoj estu, por

ĉiam, en la flamoj, konfuzitaj en komuna mizerego, kun la plej malamindaj krimuloj, kies ĉeesto malhonoris la mondon..."

Por la jezuitoj :

"Se vi troviĝus liberigitaj de la devigo doktrini, ke Sokrato, Epikteto, Platono, kaj tiom da aliaj geniuloj ne malpli bonfaraj kaj ne malpli puraj, por ĉiam estas en Infero, inter la manoj de Satano kaj de ties trabantoj, vi sentus vin malembarasitaj de peza ŝarĝo" (eltirita el la "Provincaj Leteroj").

La fama R.P. Hiacinto Loyson diris pri tiu temo beletan spritaĵon : "Dio estas la nura patro, kiu bruligas siajn geidojn".

Diri, ke la religio kristana estas konsola, estas vere aplombe...

Efektive, Kristo ripetis dekfoje : "Estos multaj vokitoj kaj malmultaj elektitoj". Kaj : "Justuloj estos tiel raraj kiel la spikoj, kiuj plu staras sur la kampo post la tritikfalĉado".

Kion konkludi el tio, se ne, ke la granda plejmulto da homoj iros al Infero ?

Cetere, ĉiu scias, ke ne ekzistas - malproksimume - 5 % el la civitanoj en la katolikaj landoj, kiuj obeas la instruojn de sia religio. Ĉiuj ĉi homoj, kiel ajn perfekta kaj morala estos ilia cetera sinteno, iros al Infero.

Sankta Aŭgusteno konfirmas tiun "konsolan" (?) tezon plej eksplicite, dirante : "Ni ne povas pledi, ke Dio devigas la animojn iĝi pekaj kaj ke li punas la senkulpulojn ; kaj tamen ne estas eble nei, ke la animoj, kiuj forlasas la korpon sen la Krista sakramento, nepre falos en la damnon".

***

Io nepre timegiga estas la komentoj de niaj "plej eminentaj" Sanktuloj pri la punoj trudataj al la punatoj, kaj la ĝojo, kiun tiu spektaklo donos al la elektitoj. Legu do :

Sankta Tomaso (Summa Theologica) :

"Por ke la sanktuloj pli ĝuu sian beatecon kaj por ke iliaj dankoj al Dio estu pli abundaj, ili rajtas rigardadi, en ĝia tuta hororo, la turmentadon de la malpiulôj."

Sankta Krisostomo (Homilio 10, pri 2a Epistolo al Korintanoj) :

"La elektitoj, ne nur 'sentos neniun kompatosenton' al la damnitoj, sed ili estos, kiel Dio, arde koleraj kontraŭ ili".

Sankta Francisko de Sales (Pri Amo al Dio, 59, ĉap. 8) :

"La justulo, kiu kantas laŭdojn pro 'Lia bonkoreco' pri la savitoj, same ĝojos, kiam li vidos la venĝon. La beatuloj aprobos, kun ĝojego, la juĝon kaj la damnadon de la punotoj".

Ĉu ne estas delikatega tiu ĝojo de la elektitoj antaŭ la turmentoj de la punatoj ?

Religio, kies "sanktuloj" povas tiel paroli, estas religio "ĉarentona", kies adeptoj estas maturaj por la frenezkarcero.

***

Io alia, kiu min ĉiam miregigis, estas la Sanktaj Skriboj senĉese parolantaj pri la "kolero de Dio", kiel ĉi-supre Krisostomo.

Kiel Dio povas senti koleron antaŭ siaj kreaĵoj? ĉar neniu el iliaj kulpoj povas lin atingi ; kaj ĉar la kolero estas (vortara difino) sento, kiu malheligas la racion, dum tiu, kiu sentas ĝin, ne plu estras sin ? Kiel la sanktaj skribistoj ne sentas, ke estas insulto al la Kreinto atribui al li koleron, kiu estas unu el la sep ĉefaj pekoj de la katolika katekismo ?

Pro kiu rajto Dio punas nin ? Li povis fari nin virtaj kaj bonaj ; li permesis, ke ni estu pekuloj ; li ĉirkaŭis nin per tentoj, antaŭsciante, ke ni falos en ilin... Oni povas fari la saman pripenson pri Adamo kaj Eva, kiujn li metis "perfektaj" en la Edenon.

- Ĉu mi parolu ankoraŭ pri la naŭzaj oferoj, kiujn Dio postulas kaj pri kiuj li donas plej zorge detalojn en ĉiuj paĝoj de Levitiko, ripetante ĉiufoje kiom "ilia odoro" estas al li agrabla !! Flarsento kaj kolero de Dio, amuze !

- Ĉu mi plie parolu pri la sklavado, nepre agnoskita de Dio, kiu donas, denove ĉi tie, ĉiujn eblajn klarigajn detalojn al la Hebreoj, dum hodiaŭ ĉiuj civilizitaj nacioj nuligis tiujn abomenajn praktikojn ?

- Ĉu mi parolu pri poligamio kaj konkubinado (kaj eĉ prostituado : li ordonas al Oseo edziĝi kun prostituitino) nepre agnoskitaj de Dio en la Malnova Testamento ; pri la 700 edzinoj kaj 300 kromedzinoj de la granda Salomono, kiun la biblio prezentas la plej saĝa el la Reĝoj, kiu oferas al la Kreinto 22 000 bovojn kaj 120 000 ŝafojn !!

Mi diru, ke tio estis severe malpermesita de Dio en la Nova Testamento, per puno de Infero, pri kiu li neniam diris unu vorton en la Malnova ??? Kia malfrua ŝanĝo en la jurisprudenco...

Ĉu mi rimarkigu, ke Dio, en la Malnova Testamento, "senĉese koleras" ?

- terura kolero al Adamo kaj Eva, al kiuj li trudas, pro peketo, la teruran punadon, kiun oni konas ;

- kolero kontraŭ la tuta homaro, kiam li apenaŭ ĵus kreis la mondon, kaj la universala diluvo, el kiu li savas nur Noan kaj lian familion;

- Preskaŭ tuj post la Diluvo, kolero de Dio kontraŭ la homoj, kiuj decidas la kreon de la "Babel-Turo" kun tute honestaj intencoj, se kre-

di la Biblion mem, ĉar ili diras : "Ni konstruu urbon kaj turon, kies kulmino atingu la ĉielon, por ke ni ne estu disaj sur la surfaco de la tero"

Tiam la Eternulo diris : "Jen ili formas unu solan popolon kaj ĉiuj havas unu saman lingvon ; kaj tion ili ekfaris ; nun nenio malhelpus ilin fari ĉion, kion ili planis. Kaj la Eternulo disigis ilin for de tie, sur la tutan surfacon de la tero."

***

Kial tiu kruelega puno, kiu probable malfruigis ege la disvolvon de la civilizo kaj ankaŭ la disvastigon de la dia parolo, kiun Dio evidente tiom deziris disvastigi ? La Biblio donas al ni neniun klarigon pri tiu nekredebla decido de la Kreinto. Je ĉiuj paĝoj de la Biblio, ĉiam Dio furiozas kontraŭ siaj kreaĵoj ; li detruas Sodomon kaj Gomoron kaj trudas al sia popolo elektita la plej terurajn mizerojn ; fine, depost la kreado de la Mondo, tiu kompatindaj homoj estas senĉese persekutataj de si Kreinto kaj tamen devas lin adori kaj danki por Liaj sennombraj bonfaroj...

***

Estas centoj da malsamaj religioj en la mondo, kaj la romkatolikoj, kiuj pretendas esti la solaj tenantoj de la vera religio, prezentas iom pli ol 17 % de la terloĝantaro. Se oni legas laŭlitere la Ordonojn de Dio kaj de la Eklezio, la 83 % ceteraj verŝajne iros rostiĝi en la Inferon, kaj ĉiu kaze ne povos eniri la Paradizon... Tamen ne estas ilia kulpo, se ili sincere kredas sian religion ; la sovaĝaj popoletoj, kiuj neniam konvertiĝis de la kristana civilizo, estos en la sama kazo.

Konfesinde estas, ke la "vera Dio" bezonas tempon por konkeri la mondon... Post la tiom longaj jaroj de alveno de Kristo, havi nur 17 % da aliĝantoj, dum li en unu sekundo povus konverti ĉiujn loĝantojn...Mi aldonu, ke tiuj 17 % estas pure teoriaj kaj el ili malpli ol unu el cent praktikas sian religion.

Kial la Skriboj diras tiun absurdaĵon, ke Dio kreis homon laŭ sia bildo ? Neeblas traduki tiun frazon alie ol agnoskante, ke Dio havas, kiel ni, du okulojn, unu nazon, unu buŝon, brakojn, krurojn kaj plie ĉiujn organojn por generado, digestado, ktp... submetitajn al ĉiaj malkvietaĵoj, kiujn ni konas.

Pri la generadorgano, se Dio havas ĝin, tio estas por uzi ĝin. Do kiel ? kun kiu ?

Plej absurdas atribui sekson al Dio. Li estas tiom supera al ni, ke Li probable havas nenion komparreblan kun homo, proza kaj difekta besto, plagata de cent mizeroj naŭzaj en ĉiuj siaj organoj.

***

Alia dogmo, ĉiutage ripetata de la kristanoj en siaj preĝoj, estas la "Revivo de la karno en la tago de la lasta Juĝo". Kiel homo, havanta ombron da saĝo, povas kredi absurdaĵon tian ? Tiuj, kiuj instruas tiun dogmon, forgesis iun punkton, tamen tre gravan : je kiu momento de la homvivo revivos la korpoj ? Se temas pri kaduka maljunulo, kiu mortis je 90 jaroj, ĉu estos la ĉifaĵo kio li estis en tiu aĝo, kiu renaskiĝos senŝanĝe ? Aŭ ĉu li renaskiĝos en la epoko de sia plena forto ? Se temas pri homo, kiu estas granda krimulo dum parto de sia vivo kaj virtulo dum la alia, en kiu epoko de sia vivo li estos revivigita ?

Kiom da miliardoj da juĝotoj estos antaŭ la tribunalo de Dio en la tago de la lasta juĝo, en la valo Jozafat ?

La kristana doktrino instruas al ni, ke nia animo estas senmorta, ke tiu animo, post la morto, elportos, dum la eterno, la kruelajn turmentojn de la Infero, se ni ne obeis, punkton post punkto, la sintenregulojn, kiujn li diktis al ni.

Tiu eterna brulado de nemateria animo estas ja stranga koncepto... Sed se la kristanismaj doktoroj tiel intencis paroli pri la korpo, kies revivigon ili instruas en la apostola simbolo, tio estas ankoraŭ pli miriga, ĉar oni ne povas koncepti, kiel korpo povas eterne bruli, post sia reduktiĝo al cindroj.

Dio, forpelante Adamon kaj Evan el la Paradizo, diris al la unua, ke li devos gajni sian panon ĉe la ŝvito de la frunto, kaj al la dua, ke ŝi naskos en doloro, kaj tio kiel puno de ilia malobeo.

Sed la bestaj inoj ankaŭ naskas en doloro ; pune pro kio ? Teologoj neniam aŭdacis paroli al ni pri senmorta animo por la bestoj. Sed ĉial la multaj animaloj, kiuj multe suferis ĉi-tere, havu kompensojn plene pravigitajn.

Plie, se la animo de la bestoj mortas samtempe kun ili, ĉial oni kredu, ke estas same por la homoj.

Kaj se la kompenso ĉi-supre pledita ekzistas nek por unuj nek por aliaj, t.e. ĉar Dio estas nejusta. Nu, ĉiopova Dio, laŭ difino, estas senfine bona, do ne povas esti maljusta.

Kaj mi plu ripetos, ke se estas Dio, li neniam montris al ni sian bonecon nek sian justecon.

Kaj ni estas devigataj lin nei, atendante, ke li alportos al ni rektajn pruvojn pri sia ekzisto, per kelkaj el tiuj multaj mirakloj, pri kiuj li tiom malŝparema estis en la epoko de la nescio kaj superstiĉo de la Skriboj.

Do oni estas kondukata konkludi, ke la mondo, kun siaj mizeroj kaj nejustaĵoj, estas neklarigebla ; ke la Darvinaj teorioj estas ekzaktaj, ke la mondo ĉiam ekzistis kaj ke homo, kun ĉiuj siaj neperfektoj, estis post centoj da jarcentoj, la rezulto de longaj evoluadoj el unu komenca ĉelo kaj ke nenie en la naturo iu ekstera Bono zorgas pri li.

***

Ne estas eble, ke senfine bona Dio kreus koŝmarecan mondon, kiel tiu, en kiu ni vivas ; kaj ankaŭ ke li kreus ĝin "el nenio", kiel al ni instruas la Skriboj, post senlaborema restado dum jarcentoj kaj jarcentoj.

Tiuj akuzoj pri maljusteco kaj kruelegeco de la Kreinto tiom ŝokis la inteligenton de ĉiuj homoj, ke, donante al si la penon rezoni, Dio, se li ekzistus, prenus la penon klarigi al ni tiun teruran misteron.

Post tiom da aliaj absurdaĵoj en niaj kristanaj instruoj, ĉu mi maltimu fari malpledon kontraŭ la "preĝo" ? Piulo preĝanta estas infano timeme ploranta antaŭ la kruelaĵoj de Dio kaj petegas lian indulgon.

Julo Simon diris pri la preĝado tiun koncizan frazon :

"Tuj kiam oni pripensas pri la perfekteco de Dio, neeblas konsenti, ke Li povus ŝanĝi ion en tio, kion Li volis, kaj ke tiu ŝanĝo povus havi kiel kialon la interpetoj de estaĵo tiom frivola, tiom senantaŭvida kiel homo ".

Tiu frazo estas ankaŭ drasta malpravigo pri la laŭdiraj mirakloj en Lurdo.

Efektive, la mirinda ordo reganta la mondon "estus" unu el la plej pezaj argumentoj favore al kreinta Dio. Kaj tiu ĉi, antaŭ la petegoj de kelkaj maljunaj piulinoj frenezetaj, malkonstruus tiun belan ordon ? Kial, se Dio faris en Lurdo resanigojn, li ne iras ĝis la vera miraklo, t.e. fenomeno mala al ĉiuj precedencoj konstatitaj de la scienco ?

Mi centfoje proponis al naivaj piulinoj 50 000 frankojn por iliaj bonkoraĵoj, se ili povus alporti al mi seriozajn atestojn pri amputita kruro, kiu rekreskus en la Lurda banejo : mi ne bezonas diri, ke mi plu atendas por pagi miajn 50 000 frankojn.

***

Ni nun revenu al preĝado :

Kiom nature estas surtere peti potenculon, kiu ege riskus vin forgesi, tiom ridinde kaj senrespekte estas, sin memorigi al "bona memoro de Dio", kiu laùdifine scias ĉion, vidas ĉion, estas senfine justa kaj senfine bona. Per preĝo, homo evidente diras al li : "Bona Dio el bona Dio... ŝajnas al mi, ke ci forgesas min"...

Sed la grotesko atingas sian kulminon, kiam la kristanoj sin turnas al tuta vico da sanktuloj el ĉiaj varioj, petante ilin, ke ili intermakleru por ili al Dio.

Kiom nature estas (mi ankoraù ripetas la saman formulon) preni al la homoj influhavajn intervenantojn, kapablajn pledi onian kaùzon ĉe potenculoj, atakante ilin ĉe ilia "malforta flanko", tiom insulte al Dio estas (li ne havas "malfortejon") uzi tiujn etajn rimedojn.

Ve ! Bezonas nur elekti el la vasta aro de la absurdaĵoj de tiu kristana instruo, kiun oni prenas kiel fundamenton por lernigi al homoj ilian konduton sur ĉi tiu tero.

Homoj sufiĉe naivaj por kredi tiujn stultaĵojn kaj reguli sian sintenon laù ili, en sia ekzistado povas fari nur stultaĵojn.

Kaj tiam ekstaras la problemo anstataùigi ĉiujn ĉi absurdaĵojn per io kohera kaj solida.

Kaj kiel fondi moralan koheran leĝaron, solidan kaj justan, se ĝi aplikiĝas al homoj parte aù tute neresponsaj ?

La homojn malligis Dio sur la teron kun danĝeraj instinktoj kaj tiranemaj, kvazaù enfermitaj en tute nigra subteraĵo, ĉia plena de obstakloj kaj falkaptiloj, poste ironie invitis ilin serĉi sian vojon al la lumo, donante al ili kiel gvidilon neakcepteblajn Skribojn, tiom pornografiajn kaj krudajn, ke la ekleziaj aùtoritatoj ilin enskribis en la Indekson. Oni sin demandas vere, kiu revolucio devos okazi sur la planedo, por ke ili fine trovu la

vojon al vero. Tiu Dio, kiu nin tiel traktas, estas ne bonfara patro, sed kruelega provoso.

Oni ofte parolas pri la abomenindaĵoj, kiujn faras en la nuna milito soldatoj el la diversaj militantaj nacioj, sed tiuj abomenaĵoj estas nenio apud tiuj, kiujn Dio eksplicite ordonis al sia popolo en la Biblio.

Legu do :

"Post kiam la Eternulo, via Dio, estos liverinta la sieĝatan urbon inter viaj manoj, vi en ĝi ĉiujn virojn glavmortigu ; sed vi prenos por vi la inojn, la idojn, la brutaron, ĉion en la urbo, la tutan predon, kaj vi "manĝos" la kaptaĵojn de viaj malamikoj, kiujn la Eternulo via Dio liveris al vi... En la urboj de tiuj popoloj, kiujn la Eternulo via dio donas al vi kiel vian heredaĵon, vi ne lasos la vivon al ĉio spiranta... por ke ili ne instruu al vi imiti ĉiujn abomenaĵojn, kiujn ili faras por siaj dioj, kaj ke vi ne peku kontraŭ la Eternulo via dio" (Readmono, 13 ĝis 18).

Kaj en dudek lokoj el la Biblio, en Josuo, Juĝistoj, Nombroj, Samuelo, oni rakontas, ke la Hebreoj laŭlitere plenumis la "sovaĝajn" ordonojn, kiujn Dio faris al ili (Josuo 11, 12 ĝis 15 ; parto 21 (86).

Belega ekzemplo de la dia justo, inter mil aliaj, troviĝas en dek frazaroj de Eliro. Oni scias, ke la Hebreoj restis kaptitoj malliberaj en Egiptio dum 430 jaroj ; ke Dio kreis ĉiujn egiptajn plagojn, ĉar la Faraono obstine rifuzis liberigi la Hebreojn ; sed, kion la sennombraj "civitanoj", kiuj ne legis zorge la Biblion, ne scias, tio estas, ke : se la Faraono tiel obstinis malgraŭ la teruraj plagoj, kiujn li altiris al sia lando, tio estas, ĉar Dio malhelpis lin. En kvar malsamaj lokoj de Eliro : 9, 12 ; 10, 2, 20 kaj 27, li ripetas, ke li "hardigis la koron de Faraono, kiu sekve ne liberigos la Hebreojn" !

Do, Dio sendis ĉiujn plagojn sur Egiption por ĝin puni pro krimo, pri kiu la Faraono neniel kulpis. Mi atendas ĉiujn kristanajn komentistojn, ke ili donu al tiu eĝaĵo kredindan ekskuzon.

Mi iros pli foren : mi diros, ke ni neniam scias, pri ajna homo, en kiu proporcio li responsas siajn plej aĉajn kulpojn, eĉ krimojn (pri tio la ekzemplo de la Faraono estas tipa), kaj ni ĉiuj estas pli-malpli viktimoj de niaj malsanoj, niaj heredaĵoj, nia edukado, kiuj al ni havas regantan influon.

***

Pri la veno de Jesuo Kristo sur la teron, Dideroto citas du belajn motojn por ĝin klarigi : "Dio bona mortigis Dion senkulpan por senkolerigi Dion justan" !! Aŭ ankoraŭ : "Kiel strange... tiu Dio, kiu igas morti Dion por kvietigi Dion!"

***

Se la kapablo "rekte" rezoni fakte ne mankus al la plejmulto de la mortemuloj, tiuj du komentoj pri Jesuo Kristo dronigus la kristanan religion en la ridindejon.

Jen alia frazo, ja topika, de Lejbnico : "Voli forĵeti racion aŭ sciencon por lasi lokon al la revelacio, tio estus sin blindigi por pli bone vidi".

Bone pripensante, oni sin demandas, kiel la homoj, posedantaj sian prudenton, ankoraŭ nun aŭdacas lerni kaj instrui la katekismon kaj precipe la Biblion, tiun kolekton de la plej ribeligaj obscenaĵoj kaj absurdaĵoj de la primitivaj barbaraj pratempoj.

Voltero faris brilajn malpledojn kontraŭ la absurdaĵoj de la Sanktaj Skriboj, pri la sennombraj krimoj faritaj sur la tuta mondo en la nomo de la religio, kaj pri la nombro da mortoj, kiujn ĝi kaŭzis, ktp. Li donis teruriganjn statistikojn pri la krimoj de Inkvizicio kaj religimilitoj ;

tio estas tiel konata historio, ke mi ne bezonas ĝin memorigi tie ĉi.

Pri la Ordonoj de Dio, kiujn ni ĉiuj trovis francverse en nia katekismo, rimarko kun plej profunda saĝo :

"Se Dio volus doni al ni kelkajn ordonojn, li tion aŭdigus al la tuta tero, same kiel li donus la lumon al ĉiuj okuloj".

Kaj plie :

"Estas kulmina hororo kaj ridindo proklami Dion kiel etan sensaĝan kaj barbaran despoton, kiu sekrete diktas nekompreneblan leĝon al kelkiuj el siaj favoratoj, kaj kiu murdas la ceteron de la nacio pro nescio de tiu leĝo".

Alia citaĵo, ankoraŭ de Voltero, kiu ne komprenas la kialon de la teraj provaĵoj, tra kiujn Dio pasigas nin.

"Ĉu ne estus ridinde kaj barbare, konstrui por siaj idoj belegan palacon, plenan de ĉiuj imageblaj delicoj, sed kies vestiblo estus karcero loĝata de bufoj kaj serpentoj, kaj enfermi siajn idojn en tiun hororan karceron, dum 70/80 jaroj, por pli bone gustumigi al ili poste la voluptojn abundajn en tiu palaco, voluptojn, kiujn ili sentos, nur kiam la vestiblaj serpentoj estos manĝintaj ilian haŭton kaj ostojn".

Ree pri la infanecaj priskriboj pri la mondo kaj ĝia kreo donitaj de la Sanktaj Skriboj : evidentas, ke ilin faris homoj, kaj Dio tute nenion diktis.

Se Dio antaŭpriskribus al ni ĉiujn gigantajn eltrovojn, kiujn faris la homa scienco depost la kreado, estus malfacile al tiuj homoj ne kredi la aliajn instruojn bibliajn.

Dio havis ankoraŭ alian manieron revelacii al ni sian potencon kaj kredigi al ni siajn instruojn ; tio estas refarante antaŭ ni unu el

la sennombraj mirakloj rakontitaj en la Skriboj.

Sed jen : ju pli progresis la Scienco, des pli malaperis la mirakloj; kaj Dio tute ĉesis sin turni rekte al la homoj, kiel Li tiel ofte faris antaŭe. Kial ?

Mi sugestas al la Kreinto belan miraklon por renaskigi la kredon al Li, mortantan : li morgaŭ detruu, per unu fojo, ĉiujn armilojn de la nunaj batalantoj, haltigante la malpuregan katastrofon, kiun li senkatenigis sur la mondon ; ni faros ĝoje ĉion, kion li petos de ni ; kaj ne plu restos nekredantoj. (*)

Ernest ARCHDEACON.

(*)Tiu tasketo estis skribata en januaro 1944. Tiu lasta paragrafo eksplikiĝas per la fakto, ke oni ankoraŭ estis en plena milito.

ALDONOJ KAJ KONKLUDOJ
*************************

Advokatoj por kristanismo al mi ofte diris : Kial vi atakas tiel akre nian religion ? Ni estas eble "dolĉaj fiksideuloj", sed ni opinias, ke ni faras bonon, kaj ĉiukaze, ni ne faras malbonon.

Ankoraŭ tie mi respondos per citaĵo el Viktoro Hugo (Agoj kaj Paroloj, vol. 1) :

"...Estas ĝi (la klerikala partio), kiu trovis tiujn mirindajn stajojn por la vero : nescion kaj eraron. Estas ĝi, kiu malpermesis al la Scienco kaj al la Genio preteriri trans la meslibro, kiu volas enŝlosi la penson en la dogmo. Ĉiuj paŝoj faritaj de la eŭropa inteligento fariĝis malgraŭ ĝi. Ĝia historio estas skribita en la historio de la homa progreso, sed skribita en la dorsflanko. Ĝi skurĝigis Prinelli-n, pro tio ke li diris "la steloj ne falos". Ĝi sepfoje aplikigis al Campanella la turmentan pridemandadon, pro lia aserto, ke "la nombro de la mondoj estas senlima". Ĝi persekutis Harvey, pro tio ke li pruvis, ke la sango cirkuladas. Nome de Josuo, ĝi enŝlosis Galileon, nome de Sankta Paŭlo, ĝi enkarcerigis Kristoforon Kolombon.

Malkovri la ĉielan leĝon, tio estis malpiaĵo, trovi mondon, tio estis herezo. Estas ĝi, kiu anatemis Paskalon nome de religio, Montenjon nome de moralo kaj religio. Estas ĝi, kiu ĉiuepoke volis meti buŝmaskon al la homa menso.

Neniu verkisto, neniu poeto, neniu pensulo,

neniu filozofo ricevis pardonon ĉe ĝi. Ĉio skribita, revita, trovita, deduktita, lumigita, imagita, eltrovita de geniuloj, la trezoro de civilizo, la jarcenta heredaĵo de la generacioj, la komuna havaĵo de la inteligentoj, ĉio estis de ĝi forpuŝita. Se la cerbo de la homaro estus tie, sub ĝiaj okuloj, je ĝia dispono, malfermita kiel paĝoj de libro, ĝi sur ĝi farus forstrekojn.

Kion ĝi faris el la popoloj, kiuj lasis sin regi de ĝi ? Kion ĝi faris el Italio, kion ĝi faris el Hispanio ? Dum jarcentoj ĝi tenis ilin en siaj manoj, je sia dispono, sub sia skurĝo, en sia lernejo ; el ili, kion ĝi faris ?

Italio, tiu patrino de la nacioj, kiu disverŝis sur la Universon ĉiujn mirindaĵojn de poezio kaj artoj, Italio, kiu instruis legi la homan specion, Italio, regata de la Eklezio, ne scipovis legi. Ĝi estis, el ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, tiu, kiu posedis malplej da legkapabluloj.

Hispanio, belege dotita, Hispanio, kiu ricevis de la Romanoj sian unuan civilizon, kiu ricevis de la Providenco, kaj "malgraŭ la Eklezio", Amerikon, Hispanio perdis, dank'al la stultiga jugo de la klerikalismo, kiu estas jugo diseriga kaj malpliiga, tiun sekreton de potenco, kiun ĝi heredis el la Romanoj, la artan genion, kiun ĝi havis el la Araboj, tiun mondon, kiun ĝi ricevis de Dio ; kaj kompense por ĉio, kion la klerikalismo malhavigis al ĝi, donis al ĝi Inkvizicion.

La Inkvizicio, kiun iuj katolikaj gazetistoj timeme provas repravigi, Inkvizicio, kiu bruligis sur la ŝtiparoj milojn da homoj, Inkvizicio, kiu elterigis mortintojn, por ilin bruligi kiel "herezulojn", ekzemple Urgel kaj Arnaldo, grafo de Forcalquier, Inkvizicio, kiu deklaris la idojn de herezuloj, ĝis la dua generacio, "malnoblaj kaj nekapablaj por ajna publika honorigo, escepte nur (tio estas la termino de la juĝo) de tiuj, kiuj eventuale denuncus siajn fratojn.

Jen kion faris la katolikismo : la fajrujo, kiun oni nomis Italio, estis de ĝi estingita ; tiu koloso, kiun oni nomis Hispanio, estis de ĝi ruinigita : unu estas cindroj, la alia ruinoj. Jen kion ĝi faris el la popoloj, kiuj sin konfidas al ĝi (*)."

***

El ĉio ĉi rezultas, ke la kristanismo faris neniun servon al la homoj, ekde sia naskiĝo sur la planedo, kaj eĉ, ke ĝi faris multe pli da malbono ol da bono. La protestantaj kaj katolikaj skismoj estas ankoraŭ kaŭzo por disruinigo por ĝi, en afero tiel grava kiel la vera religio, kiu nepre regu per maniero absoluta kaj certa la rimedon akiri la ĉielon. Iu ajn skismo estas absurdaĵo. Dio, se ĝi nur volas, donu rekte al la homoj la kompletajn regulojn de sia vera religio, anstataŭ lasi ilin padeli inter la sensencaj kaj kontraŭdiraj tekstoj de la Malnova kaj Nova Testamentoj.

Mi supre konstatis, en mia studeto, ke la katolika religio varbis 17 % de la mondloĝantoj. Mi povus ankaŭ noti, ke en Usono estas 63 malsamaj kristanaj religioj, oficiale registritaj, kun siaj personaj interpretoj de la sanktaj skriboj. Ĉiuj iliaj adeptoj, laŭ la katolikoj, iros en la Inferon.

------

(*)V.Hugo ja povus mencii, apoge de siaj akuzoj, tiun faman Indeks-kongregacion, de kiu li mem estis unu el la "kondamnitoj", pro 4/5 el siaj verkoj, i.a. "Nia Sinjorino en Parizo" kaj "Mizeruloj". La listo de la viktimoj de la Indekso okupas tutan paĝon de la Granda Larousse, publikigita en 1870. De tiam, tiu listo probable ege kreskis. Sed la sennombraj viktimoj de Indekso ŝajne rikoltis, per tiu kondamno, certan reklamon, des pli ke oni vidas la mirigan liston de la eminentaj verkistoj kondamnitaj samflanke kiel ili...

Jam do de baldaŭ du mil jaroj Jesuo Kristo venis en la mondon, por al ĝi "revelacii la veran religion' Oni ja konfesu, ke estis tamen malkuraĝige, ke Dio Patro, kiu en la Malnova Testamento multobligis la miraklojn, sukcesis nur, kiel belan rezulton, murdigi sian filon fare de sia elektita popolo, por elaĉeti la homojn el la origina peko !!! Hodiaŭ la vera religio konkeris nur la deksep procentojn de la mondo, kaj haltis ĉe tiu nombro jam de multaj jaroj.

Kaj ĉiuj ĉi kompatindaj homoj, kiuj neniam sciis pri Kristo, plu suferos surtere, atendante iri en Inferon ; kaj povruloj misiistoj iros suferi turmentojn kaj masakrojn, "por nenio", ĉe kruelegaj sovaĝuloj.

- Estas vera kulmino, ke Dio "ĉiopova" uzas rimedojn tiel mizeraĉajn, por trudi la "veran religion" al siaj "idoj" ! Tial niaj civilizuloj sin realkroĉas, pro manko de io plibona, al la pseŭdomirakloj en Lurdo, se ne pri la oraklaĵoj de somnambulo.

- Nu ! Kion atendas Dio por ĝin adoptigi subite de la tuta mondo ? ?

Li ne sukcesis ĝin konkeri, malgraŭ ĉiuj mirakloj de li iam plenumitaj (se kredi la Skribojn), dum la homoj, multe malpli kleraj ol nun, estis sendube pli facile konvinkeblaj : ĉu do li ne estas ĉiopova ? Hodiaŭ li devus diri al si : "Miaj idoj" tamen sufiĉe suferis.. Li do tiam multobligus la miraklojn ĉie sur nia planedo, tiomfoje kiom necese por ĉion konkeri.

Li konverti Sanktan Paŭlon sur la vojo al Damasko, lin persone alparolante, lin blindigante, al li poste redonante la vidkapablon. Ne kostus pli al li paroli sammaniere "al ĉiuj siaj idoj", kiuj sufiĉe suferis, punpente pro la "infaneca" krimo atribuita al iliaj unuaj gepatroj.

Kiam do tiu senfine bona Dio de la kristanoj faros tiun geston, al li tiel facilan, kiu konver-

tos fulmrapide la tutan mondon al la vera religio, kaj tiel sekurigos al la tuta homaro la ĝojojn de l'Paradizo. Tio nepre okazos la tagon kiam li estos farinta tiun miraklon. Estas tempo, ke li decidiĝu.

La katolika religio, malgraŭ siaj stultaĵoj, estis tamen iom malpli absurda ol tiu de la Olimpiaj Dioj, sed ĝi neniom gajnis al Budhismo, Bramanismo kaj Mahometismo, kiuj tenas 68% de la planedo ; la ceteraj 32 % estas tenataj de la protestantoj kaj katolikoj.

Ĝi ne plu progresas, ĝi estas ĉe la "morta punkto", ĉar la homa scienco pli kaj pli helpas demonstri ĝiajn absurdaĵojn.

Do la disfuĝego alvenos grandapaŝe. Ĉiuj kristanoj arde preĝu sian Dion fari rapide la atenditan miraklon, kiu konvertos la tutan Teron kaj fine certigos al la homoj, kiuj sufiĉe suferis, depost la kreo de la mondo, la bonstaton kaj feliĉon, kiujn ili vere rajtas. Sen tio, la Eklezio kaj ties estroj kolapsos sub la vekrioj, kaj ĝiaj nekompreneblaj instruoj lasos lokon al laika kaj scienca moralo, en des pli certa maniero, ju pli Scienco, siaflanke, gigantpaŝe marŝas, kaj fine malkovros la sekreton de nia destino. Nur ĝi sola ĝis nun havigis al la homoj la multajn pliboniĝojn (ankoraŭ nesufiĉajn) al ilia stato, kiujn ili hodiaŭ ĝuas, dum ĉiuj preĝoj de la kristanoj, depost la mondokreo, akiris eĉ neniun de ilia Dio.

Ernest ARCHDEACON.

Noto de SAT-broŝurservo : Tiu teksto aperis originale en la franca lingvo en la broŝurserio "Biblioteko de la Liberpensulo" (n-ro 63). Tradukis ĝin k-do André CAUBEL, kun la intenco publikigi ĝin en la kadro de la Liberpensa Frakcio de S.A.T.

***************************************************************

Gérant & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque Timbaut.C.P.39863

Diversaj aùtoroj: Prognozio (novelaro el la pola)
Domela-Nieuwenhuis: La Piramido de l'Tiranismo
Kropotkin: Revolucia Registaro. La Pariza Komunumo
W. Schmid: La rentumo, kiun ni pagas
Josef Burger: Rido sanigas !
H.Masson: Du rêve à la réalité : l'espéranto
H.Masson: Tabakismo kaj emancipo
J.Ingenieros: La triviala homo
Johano Rostand: Tiu, kiu ne volas morti
Alfa-Beta: Tra la mondo per biciklo kaj esperanto
M.Schneller: Vivi en komunumo
Lanti: El verkoj de E.Lanti
Han Riner: La Veraj Interparoladoj de Sokrato (tr.Lanti)

Venontaj eldonoj
****************

Lanti: Vortoj de Kamarado Lanti
Diversaj aùtoroj: Argentina Novelaro (II)
D.Heiligstein: Blankaj gardistoj
Han Riner: La aperoj de Ahasvero
Pannekoek: Sindikatismo - Sovetoj

Detala katalogo kun prezaro laù peto.